

Leterkesto-1, Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 julio 14.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-19/SRI-1988-19-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-1-Argentino-Australio-Austrio-Belgio-Brazilo-Britio.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Nia leterkesto estas denove plenplena. Tial alvenis la momento rebabili kun nia auskultantaro. En Argentino Roberto G. PONS en Neuquen (Neuken) sendis bildon de monumento, kiu omaĝas al la enmigrintoj venintaj iom post iom kreskigi la loĝantaron de lia regiono.

A.- En Aŭstralio ni havas tre fidelan kaptanton de niaj elsendoj. Li estas s-ro KANAĈKI en MELBOURNE. Interese li raportas pri la regula auskultado de niaj elsendoj. Ni citas erojn el lia letero: "La programo pri la instruado por infanoj estas tre valore prezentata, pri ata, ita, ota, kio vere donas klaran bildon kiam oni prezentas per desegnaĵoj kun la taŭga vorto kiun vi klarigis: Naĝonta, naĝanta, naĝinta knabo. Tial oni ne nur aŭdas la vorton, sed ankaŭ vidas la signifon de la vorto. Vere estas, ke ankaŭ multaj instruistoj ne tute komprenas aŭ bone klarigas tiujn signifojn. Mi persone malofte uzas tiajn esprimojn, mi trovas ke mi devas koncentriĝi forte por uzi ĝustan esprimon kiel ekzemple: se mi estis manĝonta, mia edzino estis preparonta manĝaĵon, ktp"

Cl.- En nia tiama raporto pri la perbilda instruado ni ĝuste provis atentigi la geaŭdantojn, kaj inter ili la instruantojn, ke en esperanto oni malmulte uzas la participojn kun la verbo esti. Ili estas ĝenerale adjektive uzataj, kaj nur en la lernolibroj kaj en la esperanto-kursoj oni provas traduki komplikajn frazojn, kiel tiu, kiun citis nia aŭstralia auskultinto KANAĈKI. Auskultu konversaciojn en esperanto, vi neniam aŭ preskaŭ neniam aŭdos la participajn komplikaĵojn, kiujn nur ne tre kompetentaj esperanto-instruistoj instruas en la ĉapitro dediĉita al la participoj. S-ro KANAĈKI, kiu havis la okazon auskulti nian leterkeston, krome skribis alifoje: "Dum la respondo al la korespondantoj, mi aŭdis vin legi tre interesajn leterojn, kaj bonajn proponojn."

A.- Post Aŭstralio la alfabeto ordo kondukas nin al Aŭstrio, kie ni havas plurajn skribemajn geaŭdantojn, kiujn ni salutas:

Cl.- Grete BREUNLICH en Vieno raportas, ke finiĝis la konkurso pri traduko de konata opero, proponita de Aŭstria Esperanto-Instituto en Vieno. Estis unu partopreninto, s-ro Wolfgang LOOSE de Germanio okcidenta. Per la traduko de la opero de Albert LORTZING: "Caro kaj ĉarpentisto" li gajnis la premion de dek mil aŭstria ŝilingoj kaj ricevis diplomon. La muzikfakan ekspertizon donis s-ro Ferdinand BRUCKMANN, profesoro en la universitato de Duisburg kaj esperantisto. Lingve kontrolis la verkon Hugo KRAUS, membro de la Aŭstria Esperanto-Instituto. ŝajnas ke s-ro Gerrit BERVELING en Vlaardingen, Nederlando, intencas eldoni la tekstlibron de la koncerna esperantigita opero Caro kaj ĉarpentisto de Albert LORTZING.

Al.- Ĉiam en Aŭstrio ni salutas Hugo KRAUS en Andorf.

Cl.- Ilse PANASCHELL en Wien,

A.- Leopold PATEK en Klostemeuburg,

Cl.- Heinz PLATZER en Wien,

A.- kaj s-ro B. VINCENT en Mödling bei Wien, kiu sendis artikolon pri esperanto en la angla lingvo. Bedaŭrinde li menciis nek la gazet-nomon, nek la aperdaton de la koncerna artikolo. Tial tiun artikolon ni ne povas direkti al la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia ([CDELI](#)), kiu konservas ĉiujn ricevitaĵajn artikolojn pri esperanto, kondiĉe, ke oni konu la nomojn de la koncerna gazeto kaj la tagon de la apero de la artikolo.

Cl.- El Belgio ni ricevis leterojn de Jean-Pierre VANDENDAELE en Lissewege, kiu regule raportas pri la aŭdeblo de niaj elsendoj.

A.- Ni iru al Sudameriko. En Brazilo ANDERSON LARANZA Fragoso en Vila Velha estas dudekjara universitata studento. Li jam aŭskultadis Svisan Radion Internacian en la portugallingvo. Tiel li eksciis, ke ĝi ankaŭ elsendas en esperanto. Lernante la lingvon li avidas je materialo kaj sciigoj. Ni provos lin kontentigi koncerne al Svislando.

Cl.- Ĉiam en Brazilo Antonio Luis LOURENZO DOS SANTOS en Santo do Pinha skribis: "Kredu, mi estas via konstanta aŭskultanto, ĉar vi estas la sola voĉo esperanta bone kaptebla ĉi tie en Brazilo."

A.- Trian brazilanon ni salutu: George Otto VASKE en Kai, kiu regule sendas utilajn aŭdraportojn.

Cl.- Ni revenu al Eŭropo. En la alfabeto ordo de la landoj estas nun la vico de Britio.

F. L. HOLDEN en Bradford salutas nome de la Bradforda Esperanto-Klubo. Li sendis bildkarton de unu el la vizitindaj lokoj de sia regiono, orienta Yorkshire, kiun li tiel priskribas: "Ĝi situas en la kalkŝtona regiono iom norde de Bradford. Tie malgranda rivereto tranĉis tra la kalkŝtono dum miloj da jaroj ĝis nuntempe estas profunda abismo. Oni povas sekvi la rivereton kaj grimpi ĉe ties flanko kaj post iom da tempo alveni al la supraĵo kie estas lago kiu formiĝis dum la glacia epoko. Kompreneble homoj de ĉiu parto de nia lando kaj eĉ el fremdaj landoj ĉiujare venas por vidi tiun ĉi kaj aliajn fenomenojn geologiajn en tiu ĉi regiono."

A.- Fakte en la ĵurasa montaro, kie ni loĝas en la urbo La Chaux-de-Fonds, ni trovas similajn geologiajn fenomenojn tipajn en la kalkŝtonaj regionoj.

Cl.- Tom FRASER en Kirkcaldy skribas: "Bedaŭrinde mi kaj l'edzino aĝe sumas 170 jarojn. Nur tre malfacile ni povas aŭdi klare eĉ la enlandajn dissendojn. Ni tamen provas almenaŭ kapti vian ŝatatan voĉon. Vi ja bonege servas al nia tutmonda esperanto-komunumo, pro kio ni treege estimas vin. Mi lernis esperanton antaŭ 53 jaroj per la voĉo de d-ro Privat.

A.- En Britio ni ankoraŭ salutu Paul HEWITT en Grimsby,

Cl.- Norman INGLE en Shoreham-by-sea, kiu aŭskultas radio-elsendojn en sep lingvoj,

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND malfermis la leterkeston por saluti la skribemajn geaŭdantojn. La venontan semajnon ni daŭrigos la babiladon kun niaj geaŭdantoj. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*